# *Kubo por pli granda savo de dokumenta hereda?o*

*Image not found or type unknown*

La Nacia Komitato de la Unui?o de Historiistoj de Kubo (Unhic) kaj la Nacia Arkivo de la Respubliko subskribis en Havano laborinterkonsenton, kiu plifortigas la ligojn inter la institucioj kaj kontribuas al la konservado kaj savado de la dokumenta nacia hereda?o.

En la fermaj rimarkoj de la lasta sesio de la VI ordinara kunveno de tiu organizo okazinta  en Havano, la vicministro pri kulturo, Fernando Rojas, rekonis la gravecon de la interkonsento, kiu permesos aliron al transcendaj dokumentoj de la kariba insulo.

Li asertis, ke la Unhic povas konsideri pli grandan partoprenon en la plifortigo de la politikoj de la Revolucio, atenton al la makroprogramoj de la Registaro kaj atingi pli grandan influon de historiaj aferoj en Edukado.

Siaflanke, la prezidanto de Unhic, Jorge Luis Aneiros, atentigis, ke en la kunveno, okazinta ekde la 17-a de februaro en la Kongresejo, estis analizita la administrado de la lastaj du jaroj kaj la projekcio de sciencaj eventoj por 2022, inter ili, la Nacia Kongreso de Historio kiu okazos en Pinar del Río, de la 21-a ?is la 23-a de aprilo.

En tiuj ?i kunsidoj oni taksis anka? la preparadon de la provincaj asembleoj, kiuj komenci?as en marto kaj la respondaj modifoj de la provincaj premioj kaj la nacia premio pri historio.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/cultura/286904-kubo-por-pli-granda-savo-de-dokumenta-heredajo

**Radio Habana Cuba**